



informAS!

Ago-Semajno
simple venu :)

27.12.2008-04.01.2009
Liptovský Mikuláš, Slovakio

Unufoja reta
bulteno por AS-
partoprenontoj.

Enhavo:

Alveno k akceptado	2
Je via dispono	2
Konkurso	2
Eŭro en Slovakio	3
Prezentu kulturon	3
Prezentu aranĝon	3
Ludejo	3
Adresoj k kontaktoj	4
Trajnhoraro	4
Kiel atingi ASejon?	4

Por ke nia kulturo ne nur travivu:

...neforgesebla etoso,
neordinaraj homoj, ne-
streĉa programo, nemal-
bela loko, nekutimaj ideoj
pasi tempon kaj neenua
freneza novjara balo!

Proksimiĝas novjara tempo kaj ni jam antaŭ-
ĝojas (re)vidi vin ĉi-foje
en Slovakio! Atendas vin
ĉi tie pluraj atrakciaĵoj.
Kompreneble la kerna
estos **novjarbalo**, kiu
feliĉe ĉi-jare ne signifas
finon de la aranĝo, sed
nur ĝian duonon ;) Ne
mankos ankaŭ tradicia
K u l t u r - L i n g v a
Festivalo, pri kiu ni pli
detale informas en la
3-a paĝo de la bulteno.
Krome, aparte interesa
estos tuta kultura
programo dum Ago-
Semajno. Atendas vin
ne nur **nacia vespero**
kaj **teatraĵoj**, sed ankaŭ
pluraj **koncertoj**. Dum
KLF dancigos nin
jOMO, alian tagon
orelojn plezurigos finna
rok-bando **Dolchamar**.
Ekskluzive dum Ago-

Semajno koncertos
repa duopo **Pafklik**
kaj sveda grupo **La**
Perdita Generacio,
kiuj ĵus eldonis
siajn novajn dis-
kojn. Ne malkonten-
tos ankaŭ ŝatantoj
de barda stilo, ĉar
kantos por ni
Georgo Handzlik
kaj **Elena Melnikova**.
Tage **distros** vin
danckursoj, teatr-
umadoj kaj ludaj
programeroj. **Movad-**
emuloj povos interalie
partopreni seminarion
„Flugiloj de malfacila
vento”, informiĝi pri
proksimiĝantaj E-
aranĝoj, kaj pri agado
de E@I kaj EDE. Krome
eblos renkontiĝi kun
geamikoj festantaj
novjaron en Germanio
kaj Japanio dum



Jen foto de ASejo :)

videokonferenco inter
AS, IS kaj KS. Tiujn,
kiuj de AS deziras
reveni pli saĝaj, atendas
pluraj kursoj kaj
prelegoj nur pri
interesaj temoj (vere!).
Lingvemuloj trafos al
programa paradizo, ĉar
ja tia estas nia ĉi-jara
temo, kaj **vojaĝemuloj**
povos partopreni
kelkajn vere brilajn
ekskursojn.

Do — simple venu :)



Lingvoj – pordo al interkulturo

Jen nia ĉi-jara frap-
frazo. Omaĝe al la
„Internacia jaro de lin-
gvoj” de UNESCO kaj al
„Eŭropa jaro de inter-
kultura dialogo” de EU
ni decidis dediĉi multe
da programeroj de ĉi-
jara AS-o al lingvoj.

Eble la plej amuza
povas iĝi la poste pri-
skribita konkurso. Aldo-
ne vin atendas lingvo-
kursoj, prelegoj pri lin-
gvoj, aligatorejo, KLF... –
do riĉa semajno, plena
de interesaj programe-
roj. Ĝuu ĝin kun ni :)

Alveno kaj akceptado

Ni kongresumos en lernejo ĉe jena adreso: Obchodná akadémia, Nábřežie K. Petroviča 1571, Liptovský Mikuláš, Slovakio. La junulargastejo estas nur 40 metrojn for. Akceptejo troviĝos en junulargastejo.

Pli frua alveno

La organiza teamo aperos surloke la 26-an de decembro post-



Lasu virtualan mondon kaj venu vidi la realan — ekskluzive dum AS ;)

tagmeze. Ekde tiam eblas akcepti- ĝi kaj ekloĝi en junulargastejo aŭ amasejo: krompago 8€ aŭ 3€.

Akceptado

Preskaŭ ĉiam dum multnombraj aranĝoj akceptado apartenas al la plej malŝatataj partoj de renkontiĝo. Lacaj post la vojaĝo vi devas atendi, ofte

longe, se samtempe venos multaj. Por eviti tion dum AS ni petas:

- fiksi en la memoro vian aliĝnumeron,
- havu dekalkulitan monon por rapide kovri vian kotizon - se vi ne scias, kiom vi pagos surloke, nun demandu,
- se vi intencas ŝanĝi viajn aliĝkondiĉojn, nun ni petas kontakton.

Estas ja tempo anticipi ĉion solvi, ĉu?

Je via dispono

Interreto

Kelkaj legante tion supozeble finfine trankvile respiras ;) Jes, interreto estos — kompreneble senpaga. Ĉiutage dum kelkaj horoj disponeblos komputila ĉambro. Krome ni klopodos instalit sendratan reton, tamen ankoraŭ nenion povas garantii.

Amasloĝantoj ne forgesu kunporti matracojn kaj dormosakojn ;)

Teo-kafo-bufedo

Jam kutime dum AS je via dispono estas senpaga teo-kafo-bufedo. Tamen ĉi jare estos eĉ du! Kaj pli precize: po unu en ĉiu konstruaĵo ;)

Do nepre kunportu propran tason kaj kulereton.

Tabloteniso

Jes estos, do vi rajtas preni vian plej ŝatatan rakedon ;)

Aŭto-parkejo

Inter kongresaj konstruaĵoj troviĝas parkejo por dekelkaj aŭtoj, do tio ankaŭ senproblemas ;)

Konkurso por lingvemuloj

Por iom spicigi la aranĝon kaj resti fidela al ĉi-jara slogano de la aranĝo „Lingvoj – pordo al interkulturo” ni pretigis por la lingvemaj, vortludemaj Esperantistoj interesan kaj amuzan konkurson:

La kondiĉo estas: Elpensu rakonton, en kiu vi uzus nur vortojn, kiuj komenciĝas je la sama litero.

La plej amuzaj kaj plej longaj (tamen sencohavaj!) rakontoj ricevos valorajn E-premiojn (librojn, DVDjn, T-ĉemizojn). La aljuĝo de la premio okazos la 2-an de januaro vespere – antraŭ la komenciĝo de koncertoj. Kondiĉo por ricevi la premion estas la mem-deklamado de la verkinto (aŭ de verkokolektivo).



Spertu kun slovakoj kune transiron al eŭro

Kiel eble vi jam scias, Slovakio ekde 1a de januaro 2009 transiras de uzado de slovak krono (SKK) al uzado de komuna eŭropa valuto EURO (EUR). Tiel ankaŭ vi mem povos sperti unuajn momentojn de tiu ĉi valuto dum januaro. Efektive, oficiale ĝis 31-a de de-



Stabila ŝanĝkurzo:
1 EUR = 30,126 SKK
(dum AS 1 EUR = 30 SKK)

cembro validas slovak krono – per kiu oni pagas kutime en Slovakio. Sed – kompreneble dum AS kaj por ĉio en AS-ejo (ekskursoj, libroservo, drinkejo, bufedo...) vi rajtas pagi jam per EURO. Krome, ankaŭ multaj grandaj vendejoj jam akceptas pagojn en eŭro. Tial do – se vi tamen bezonos ŝanĝi monon al kronoj, faru tiel en ne tro granda kvanto. Ambaŭ

valutoj validos alterne ĝis 15-a de januaro.

Se al vi tamen restos slovakaj kronoj – kiujn vi ne plu povos utiligi, eblos ilin ŝanĝi ĉe organizantoj al eŭro (ev. elspezi rapide en drinkejo aŭ libroservo :)).

Ĉu vi scias ke...

La nomon „EURO” por la komuna eŭropa valuto elpensis esperantisto! Li nomiĝas Germain Pirlot kaj estas el Belgio.

Prezentu vian kulturon

Dum AS (la 30-an de decembro) okazos Kultur-Lingva Festivalo, kiu estos malfermita por ĉiuj, ĉar per ĝi ni celas prezentadon de Esperanto al neesperantistoj - loĝantoj de Liptovský Mikuláš kaj turistoj.

Por ke la evento estu trafa kaj sukcesa ni petas pri via kontribuo.

La festivalon inaŭguros sursceneja prezentiĝo de nacioj, kie vi povos arte prezenti vian kulturon. Sekve, ĉe standoj, vi havos ŝancon prezenti vian landon, regionon, lingvon ktp. rekte al la gastoj de la festivalo.

Bonvolu kunporti emon popularigi vian nacian kulturon, muzikilojn,

informilojn, specialaĵojn, fotojn, mapojn, afiŝojn, poŝtkartojn, flagojn... Simple ĉion, kio ebligos la plej interesan prezenton.

KLF

**Ni sciigu
aliajn pri
ni :)**

Prezentu vian aranĝon

Komenciĝas la jaro 2009, kalendaro de E-aranĝoj abundas, do kion elekti?

Ne permesu, ke oni maltrafu eventon, kiun vi organizas. Venu varbi!

Ni certigos al vi iom da reklam-tempo kaj ĉiun necesan aparataron. Vi certigu reklamilojn, fotojn, filmojn, lumbildarojn, rakontojn kaj ĉion, kio permesos logi homojn al via aranĝo.



Ludejo

Dum la semajno funkcios ludejo, kie vi povos ĝui diversajn ludojn.

Ni petas, se vi havas iun interesan ludon kiun vi ŝatus ludi dum AS, ne hezitu ĝin kunporti.

Adresoj k kontaktoj

Petro: +421902203369 (SK)
petro@ikso.net

Katka: +421918774943 (SK)
k.noskova@wp.pl

Irek: +48508779098 (PL)
viavento@poczta.onet.pl

LukiZ: +48500044300 (PL)
lukiz@pej.pl

Obchodná akadémia
Nábřežie K. Petroviča 1571
Liptovský Mikuláš

www.as.pej.pl

TRAJNHORARO

de Bratislavo: 00.10-R, 6.10-R, 8.10-R, 9.55-IC,
10.10-R, 12.10-R, 14.10-R, 16.10-R, 17.35-IC.

Daŭro: 3.53-R, ĉ.3.15-IC.

de Žilina: 2.55-R, 3.35-R, 3.55-R, 6.55-R, 7.18-Os,
8.55-R, 9.43-Os, 10.55-R, 12.09-IC, 12.55-R, 14.55-R,
16.31-EC, 17.05-R, 18.55-R, 19.55-IC, 21.33-Os.

Daŭro: ĉ.1.10-R, ĉ.1.40-Os, 0.56-IC/EC

de Poprad-Tatry: 1.25-R, 4.19-Os, 6.14-Os,
6.45-IC, 7.25-Os, 9.25-Os, 9.55-EC, 10.35-Os,
11.25-R, 13.25-R, 14.36-IC, 14.47-Os, 15.25-R,
16.37-Os, 17.25-R, 18.12-Os, 19.25-R,
20.02-Os, 22.49-R, 22.54-Os, 23.25-R.

Daŭro: ĉ.0.45-R, ĉ.1.00-Os, ĉ.0.40-IC/EC

Varsovia Vento

PEJ POLA
ESPERANTO
JUNULARO

SK E J

LEK

Kiel atingi ASejon?

Kiel klare videblas en la mapeto - la vojo de stacidomoj al ASejo estas simpla kaj facila :) Tamen ni klopodos en videblaj lokoj pendigi voj-montriloj. La distanco inter la stacidomoj kaj ASejo estas pli malpli 15 – 20 min perpede.

Priskribo por mapo-malŝatantoj:

Post foriro de la stacidomo iru rekte ĝis fino de la strato (tie vi vidos urbodomon antaŭ vi). Sekve turniĝu dekstren kaj transiru la ponton super rivero. Tuj poste iru la unuan strateton maldekstre, denove ĝis fino kaj jen - pordego al ASejo :)

